

La Redaktoro

Kontribuaĵojn sendu papere (prefere maŝinskribite), aŭ en elektronika formato al la redaktoro:

Poŝte:

Johan KÖHLER
P.O. Box 245
WINKLESPRUIT
4145
Respubliko de Sud-afriko

Retpoŝte: kohlerj@webmail.co.za

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Nemembroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto.

S-ro C. Beckford
43 Fairview Crescent
MILNERTON RIDGE
7441
Respubliko de Sud-Afriko

Enhavo

| | |
|---|----|
| Ĉe la forpaso de Bob Kok..... | 3 |
| Vortoj de la eks-redaktoro..... | 4 |
| Jen via Bona Espero..... | 5 |
| Enlanda Agado..... | 6 |
| Fritz Deelman en die Groen Dood (uittreksel)..... | 9 |
| Fritz Deelman kaj la Verda Morto (elĉerpaĵo)..... | 9 |
| Eĉ CAF bezonas Esperanton..... | 17 |
| Polemiko: Sudaŝtato kaj CAF..... | 17 |
| Ret-gazeto “La Amikeco”..... | 19 |
| Unu somera semajno tendume kun 40 Esperanto-parolantoj..... | 20 |
| Tutregiona Semajna Kongreseto! | 22 |
| Verlingvaj Etikedoj..... | 23 |
| Polemiko (daŭrigata)..... | 24 |
| Korespondi deziras..... | 25 |
| Letero el Aŭstralio..... | 26 |



*Supre: EKDO membroj portantaj la nova t-
ĉemizoj (vidu p. 7) fotis: Anzuruni M'SABAH*

Forpaso

Ĉe la forpaso de Bob Kok

Bob Eduard Kok (1935.8.3-2005.3.29), unua redaktoro de Bona Espero, forpasis post longdaŭra malsano.

Li fuĝis el S-A ĉar la registaro malŝategis lian helpon al bienlaboristoj en la Okcidenta Kabo fondi sindikaton/profesian premunion.

Ne longe antaŭ lia forpaso, Nederlanda ĵurnalo intervjuis lin pri E-stratnomoj pro la centjariĝo de Esperanto en Nederlando.

Li lasas lian edzinon Truus, du filinoj kaj siaj edzoj, kaj tri genepojn, kaj eks-edzinon Anita Becker.

Kontribuis Axel von Blottnitz, Anita Becker kaj Edwin de Kock

***ĈE LA FORPASO DE
BOB EDUARD KOK
(1935.8.3-2005.3.29)***

*Kiel okazis,
ke mi vin daure vidas
trans kvardek jaroj
dum ridetanta juno
sub la Afrika suno?*

2005.04.03, Edinburg, Teksaso

-- Edwin de Kock

Redaktore

Vortoj de la eks-redaktoro

“En la mondon venas nova sento”

En la Esperanto-movadon en Suda-Afriko venas nova sento – la entuziasmo de junuleco. Dum multaj jaroj, la estraro de EASA restis la samajn homojn. Nun ni havas junajn komitatanojn. Je la komenco de 2005, Johan KÖHLER konsentis preni la taskon de la redaktoro de Bona Espero.

Mi tre dankas Johanon pro sia transpreno. Dum la lasta jaro mi laboro kaj mia familio demandis pli multe de mia tempo. Por tiu kialo mi ne havis, kaj mi ne havos, la tempon por fari tiel multaj taskoj kiel mi volas.

Mi esperas, ke en la estonteco la eldonoj de Bona Espero aperos pli ofte, kun pli interesaj enhavoj.

Multan dankon, Johano.

Julian CLOETE



:-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) :-) HUMORO

Okaze de vegetaranisma seminario renkontiĝas voluptukisto, interlingvaano kaj esperantisto, kaj ili konversacias kaj komparas siajn lingvojn.

Iam la voluptukisto demandas la interlingvaanon: Diru, kiom ofte la litero L aperas en la himno de interlingvaö?

La interlingvaano kalkulas kaj respondas: In nostra himna es 17 literas L! Et in vostra himna, senjoro de Esperanto, kiomas literas L es in himna de Esperanto?

La esperantisto kalkulas longtempe kaj diras: 192.

Jen la voluptukisto miras sin: Tiom multe? Ĉu vi povus kanti tion al ni?

Kompreneble, la esperantisto bonvolemas: En la mondon venis nova sento, la la la la la la la...

Redaktore

Jen via Bona Espero

Karaj gelegantoj,

Ne tiom facilas kompili kaj redakti gazeton, eĉ malgrandan – tio mi denove konstatis, pretigante tiu ĉi numeron.

Mi simpatias kun la eksiĝinta redaktoro. Vere, gazeton ne povas fari nur unu persono. Se pluraj homoj ne respondis al mia peto por artikoloj, kaj ne sendis tiom bele verkitajn artikolojn, multe pli malfacilus la laboron. Al tiuj homoj mi dankas, kaj memorigas pri la venonta limdato 15^a de Junio 2005. Al homoj, kiuj legas, sed ne kontribuis, mi ankaŭ memorigas pri la limdato! Dankon al Colin BECKFORD kiu lingve kontrolis la tekston. (Ĉiuj eraroj kiujn vi trovos estas tute miaj, post lia kontrolado)

En tiu ĉi numero vi trovos 9 diversajn artikolojn kaj (nur!) 1 reklamo. Inter la artikoloj estas du-lingva artikolo (afrikansa-esperanta) kiu aperis en la EKDO Bulteno antaŭ kelkaj jaroj. Estas artikolo pri korespondado kiu celas komencantojn, kaj estas skribita per facila lingvaĵo. Aldone troviĝas agadraporto pri aktivado en la regionoj. La cetero de la artikoloj temas pri interpretado, Esperanto-tendumado, memorigo pri l' juneco, kaj retgazeto por junuloj. Fine troviĝas korespondpeton el Aŭstralio, al kiu oni proponas interesan agadon.

Mi timas, ke homoj ĉi-foje nekutime bone kontribuis. Tial, ne tiu ĉi numero, sed la venontaj estos pli bona indikilo, ĉu mi kiel redaktisto sukcesis aŭ ne.

Jen nia Bona Espero, jen via Bona Espero. Legu, kritiku, kontribuu ... kaj ĝuu.

Johan KÖHLER

NIA MOVADO

Enlanda Agado

Kaburba regiono

(informoj de Magali VON BLOTTNITZ)

Novaj membroj

Du junuloj, Sonja Lakemeier kaj Joseph Bicingini Apasa, membriĝis. Sonja estas studentino ĉe Universitato de Stellenbosch. Ŝi venas de Namibio. Joseph estas memlernanto, kaj interesiĝas pri la historio de Esperanto, la movado kaj lingvistikaj demandoj. Li venas de Kongolando. Morné van der Merwe (ankaŭ junulo) iĝis dumviva membro.

Instruado

Oni klopodos starigi aldonan kurson en/ĉirkaŭ Woodstock. Montriĝis multa intereso, speciale de Kongolandanoj en Kaburbo, varbitaj de Benjamin. Ankaŭ ni esperas vendi almenaŭ unu perkorespondan kurson, kaj eble Morné sukcesos starigi kurson en Stellenbosch (jam li instruas al Sonja). La Kaburbanoj prepariĝas nun por elementaj kaj mezgradaj ekzamenoj, kiuj verŝajne okazos ĉirkaŭ Majo. Interesiĝuloj kontaktu Magali.

Varbado

La tago de gepatraj lingvoj donis okazon por varbi. Speciale, ni metis afiŝojn angla- kaj afrikanslingvajn en Kaburba kaj Stellenbosch-a universitatoj kaj aliaj lokoj, kaj Magali donis intervjuon por loka "Bushradio" kaj refreŝigis kontaktojn kun lingvaj organizaĵoj ĉirkaŭ Kaburbo. Tamen, ni ne ricevis rektajn rezultojn el tiu agado.

Renkontiĝoj

La venonta kluba renkontiĝo (19a de marto) estos malfermata al la publiko kaj jam kontaktis nin unu sinjorino por informiĝo. Sonja kaj Morné planas varbi ĉe la Universitato de Stellenbosch.

Kongreso 2006-a

Kongreso en Kaburbo en 2006 planatas. Ni estas jam serĉantaj taŭgan ejon kaj Loka Kongresa Komitato formiĝos dum nia venonta renkontiĝo (19a de marto).

Johanesburgo/Pretorio

(informoj de Axel VON BLOTTNITZ)

Eksterlanda Vizitanto

Vizitanta Germana Esperantistino, 16-jaraĝa Lethabo Luisa Rund el Berlino, loĝas en Soshanguwe ĉe Pedia gastfamilio por tuta jaro ĝis Junio. Kontakteblas ŝi pere de gastpatrino Tabane (tel. 012 797 2050)

Renkontiĝoj

1an de Februaro okazis Komitatkunveno ĉe la domo de Oskaro SHER. 6an de Februaro okazis sociparoliga kunveno ĉe Kornish Kettle en Nellmapiusvojo, IRENE. Partoprenis Jan & Salome STRYDOM, Oskar SHER, Josef KATUNDA kaj amiko, Axel VON BLOTTNITZ, Mildulo MOKONE kaj Luisa Rund.

Kampanjo

Kampanjo diskonigi la "Tagon de la Gepatra Lingvo" (21an de Februaro) (sub aŭspicioj de UNESKO kaj UEA) kunordigis Axel VON BLOTTNITZ. La informiloj tradukiĝis al la Afrikansa, kaj oni dissendis ĝin al pluraj ĵurnaloj.

Novaj esperantistoj

Iain kaj Denise SCOTT el la Johanesburga regiono aliĝis la dissendoliston EASA-membroj. Ili lernas aŭtodidakte.

Durbano

(informoj de Johan KÖHLER)

Novaj membroj

Nia plej nova (estonteca) membro, Enoce BY'ELONGO, naskiĝis la 26an de Decembro 2004 al fieraj gepatroj Elisée kaj Elizabeto. Gratulojn,

denove! Clifford Mathaba eklernas Esperanton. Li eksciis pri la lingvo pere de lia agado en la organizaĵo Centro por Informado, Trejnado kaj Disvolvigo (C.I.T.D).

T-Ĉemizoj

Celante la varbadtago, ni desegnis kaj produktis 10 t-ĉemizojn kun la slogano “Parolu kun la mondo” en la angla, zulu kaj afrikansa. La nomo de la klubo montriĝas. La desegnaĵo estas oranĝa kaj la ĉemizo nigra. La ĉemizoj kostas R60-00, kaj C.I.T.D. subvencios iomete por nepagipovuloj. La prezo estas tre alta, sed urĝis, niaopinie. Se ni atendus du semajnoj pli, kaj mendis 35 ni povus pagi po R30-00. Restas du ĉemizojn nevendatajn, en grandeco L.

Varbado

Klubanoj Elisee, Jozefo Yaye, Anzuruni, Johan kaj lernanto Clifford Mathaba varbis ĉe la malferma tago de kluboj kaj societoj de Universitato de Kwazulu-Natal. Ni disdonis broŝurojn kaj havis komputilon surloke kun elektronika montrado de Pasporta Servo (kiel antaŭe), baza gramatiko, muziko kaj la komputilprogramo “Kurso de Esperanto”. Malgraŭ dudeko da interesituloj kiuj subskribis, nenion konkretan evoluis.

Enkonduki Esperanton ĉe UKZN Lingvocentro

Ni klopodas instaligi la komputilprograman kurson en komputilcentro apud la Lingvocentro. Pli facila estus enkonduki sonbendan kurson en la Lingvocentro mem. Ni serĉas taŭgan kurson, kaj donacos ĝin. Sugestoj bonvenas.



AFRIKAANS

Fritz Deelman en die Groen Dood (uittreksel)

*W*anneer mense my vra hoe ek aan Esperanto gekom het, is my antwoord ietwat ongewoon. My eerste kennis-making met Esperanto was deur 'n jeugroman in die „Fritz Deelman” reeks deur Suid-Afrikaanse outeur, Leon ROUSSEAU. Die boek was „Fritz Deelman en die Groen Dood”.

Die reeks speel af in die nabye toekoms, waar beeldfone die telefoon se plek ingeneem het, en private helikopters („heli's”) en lugtaxi's 'n gewilde vervoermiddel geword het.

Fritz Deelman is 'n luitenant in die Suid-Afrikaanse Veiligheids-diens, die plaaslike tak van die wêreld-wye Veiligheidsdiens. Fritz en sy vriendin Loekie beland dikwels saam in situasies waar Deelman se

*K*iam homoj min demandas, kiel mi interesiĝis pri Esperanto, mi respondo estas iomete nekutima. Mi unua renkontiĝo kun Esperanto estis pere junulnovelo en la serio „Fritz Deelman” de la Sudaŝrika verkisto Leon ROUSSEAU. La libro estis „Fritz Deelman kaj la Verda Morto”

La serio prezentas la ne-foran estontecon, kie vidtelefonoj antstataŭas la telefonon, kaj privataj helikopteroj kaj aertaksioj populariĝis por veturado.

Fritz Deelman estas leŭtenanto en la Sudaŝrika Sekurecservo, la loka fako de la tutmonda Sekurecservo. Fritz kaj sia amatino Loekie ofte troviĝas en situacioj, kie la

AFRIKANSE

Fritz Deelman kaj la Verda Morto (elĉerpaĵo)

moed en speurvernuf tot die uiterste beproef word om hul vyande vas te trek.

In die reeks is Esperanto „'n taal waarmee alle lede van die Veiligheidsdiens vertrouwd moet wees”. Dit dien as 'n gemeenskaplike taal tussen lede van die Diens van verskillende lande. So het ek die eerste keer met Esperanto kennisgemaak. Ek het in die daaropvolgende jare die boek (en ander in die reeks) meer as een keer gelees, en die woord Esperanto het êrens in my kop vasgesteek.

Eers jare later, in 1998, het ek toevallig 'n Esperanto leerboek op 'n uitverkoop raakgesien.

- Johan KÖHLER

Fritz Deelman en die Groen Dood (uittreksel)

¹Fritz en Loeki ontbied 'n lugtaxi en binnekort suis hulle oor die wit wolkekrabbers en woelige stadsverkeer van Rio de Janeiro.

²„Pragtige geboue,” sê Loeki bewonderend.

³„Party wat vandag nog so hiper-modern lyk, is al taamlik oud,” merk Fritz op. „Tussen 1950 en 1960 gebou. Hulle argitekte het 'n geweldige invloed op die wêreld se

kuraĝeco kaj detektiva lerteco de Deelman ĝislime pruvigas por aresti iliajn malamikojn.

En la serio Esperanto estas „lingvo kion familiare devas koni ĉiuj anoj de la Sekurecservo”. Ĝi funkcias kiel komuna lingvo inter anoj de la Servo de malsamaj landoj. Tiel mi unua foje konatiĝis kun Esperanto. Mi dum la postaj jaroj plurfoje legis tiun libron (kaj aliajn en la serio), kaj la vorto Esperanto restis ie en mia kapo.

Nur post jaroj, en 1998, mi hazarde vidis Esperantan lerno-libron vendatan malmultekoste.

- Johan KÖHLER

Fritz Deelman kaj la Verda Morto (elĉerpaĵo, tradukis J.K.)

¹Fritz kaj Loeki alvokas aertaksion, kaj postnelonge ili svebas super la blankaj altaj konstruaĵoj kaj freneza urba trafiko de Rio de Janeiro.

²„Belegaj konstruaĵoj,” diras Loeki mirante.

³„Kelkaj kiuj aspektas tia hiper-moderna jam estas sufiĉe malnovaj,” diras Fritz. „Inter 1950 kaj 1960 konstruitaj. Ilia arkitektoj ege influis la mondan konstrustilon, ankaŭ Sudafrikon. Ili estis la unuaj homoj,

boustyl gehad, ook op Suid-Afrika. Hulle was die eerste mense wat hul geboue *werklik* suksesvol by 'n tropiese en halftropiese klimaat kon aanpas.”

⁴„Dit het ek ook in die gidsboek gelees,” spot Loeki. „Jy hoef nie so geleerd te klink nie.”

⁵„Jammer,” sê Fritz en glimlag. „Maar dit lyk my ons is hier.” Voor hulle lê 'n uitgestrekte netwerk geboue teen die graniethellings van 'n steil berg.

⁶Dan weerklink 'n gedempte pinggeluid deur die heli. Die Veiligheidshoofkwartier is verbode gebied vir burgervliegtuie, en hulle is klaarblyklik met radar waargeneem. Iemand praat in Portugees oor die taxi se radiofoon. „Veiligheidshoofkwartier, Rio de Janeiro. Wie is jou passasiers? Het hulle magtiging om te land?”

⁷Die taximan draai in sy sitplek om en kyk vraend na Fritz wat nie die Portugees verstaan het nie, maar dadelik begryp het waarom dit gaan. „Sê vir hulle ek is luitenant Fritz Deelman van die Suid-Afrikaanse Veiligheidspolisie,” sê hy in Engels. „Ek het 'n belangrike mededeling.”

⁸Die taximan knik en begin vinnig

kiuj *vere* sukcese adaptigis siajn konstruaĵojn al tropika kaj duontropika klimato.”

⁴Ankaŭ mi legis tion en la gvidlibro,” ŝercas Loeki. „Vi ne necesas soni klerule”

⁵„Mi pardonpetas,” diras Fritz kaj ridetas. „Tamen, mi pensas ke ni alvenis.” Antaŭ ili kuŝis etenditan reton de konstruaĵoj je la granitdekklivoj de kruta monto.

⁶Tiumomente eĥas dampita sonon tra la helikoptero. La Sekurecstabejo estas malpermesita areo por civitanaj aerplanoj, kaj oni ŝajne observis ilin per radaro. Iu parolas en la portugala tra la radiotelefono de la taksio. „Sekurecstabejo, Rio de Janeiro. Kiu estas via pasaĝeroj? ĉu ili havas permeson surteriĝi?”

⁷La taksiisto turnas sin en la seĝo kaj demande rigardas al Fritz, kiu ne komprenis la Portugalan, sed tuj komprenis pri kio temas. „Diru al ili, ke mi estas Leŭtenanto Fritz Deelman de la Sudafrika Sekurecpolicio,” li diras en la angla. „Mi havas gravan informon.”

⁸La taksiisto kapjesas, kaj rapide repondas. „Oni diras, ke ni povas eniri por ke vi pridemandiĝu” li interpretas post la voĉo denove parolis.

terugpraat. „Hulle sê ons kan inkom sodat julle ondervra kan word,” tolk hy nadat die stem weer gepraat het.

⁹Fritz knik. Toe die taxi op die parkeerterrein neerstryk, tree 'n jong Veiligheidskonstabel vorentoe. Fritz klim uit en oorhandig sy kenteken. Die konstabel kyk daarna en salueer. „Hierheen, luitenant Deelman,” sê hy beleef in basiese Esperanto, 'n taal waarmee alle lede van die Veiligheidsdiens vertrouwd moet wees. „U gesellin sal ongelukkig in die taxi moet wag.”

¹⁰Fritz kyk terug. Nog 'n konstabel het dadelik naby die lugtaxi stelling ingeneem. Die gebruik van die Internasionale Veiligheidspolisie is in alle lande dieselfde.

¹¹Hulle stap tot binne die groot gebou waar Fritz sonder versuim na die kantoor van die plaaslike Veiligheidshoof, generaal Camoes, gebring word en sy storie vertel.

¹²„Dit is baie interessant,” sê die Brasiliaan nadat hy klaar geluister het. Hy trek 'n kabinet oop, haal 'n legger uit en blaai vlugtig daardeur totdat hy die plek vind.

¹³„Ja, ons het nog steeds 'n beskrywing van dié kaptein Dolck,” sê hy. „Ek sal dit laat wysig en die Veiligheidsdiens en Polisie

⁹Fritz kapjesas. Kiam la taksio surteriĝas je la halt-tereno, juna Sekurecpolicano alproksimiĝas. Fritz elgrimpas kaj transdonas sian insignon. La policano ĝin inspektas kaj salutas. „ĉi tien, leŭtenant' Deelman,” li ĝentile diras en elementa Esperanto, lingvon kiun ĉiuj membroj de la Sekurecservo devas koni. „Via kunveturantino bedaŭrinde devos atendi en la taksio.”

¹⁰Fritz malantaŭen rigardas. Alia konstablo tuj stariĝis apud la aertaksio. La kutimo de la Internacia Sekurecpolico estas same en ĉiuj landoj.

¹¹Ili marŝas en la grandan konstruaĵon kie Fritz tuj konduitiĝas al la oficejo de la loka Sekurecestro, general' Camoes, kaj la historion rakontas.

¹²„Tre interese,” diras la Brazilo aŭskultinte. Li malfermtiras ŝrankon, elprenas dosieron kaj rapide trafoliumas ĝin ĝis li la lokon trovas.

¹³„Jes, ni ankoraŭ havas priskribon de precize tiu ĉi kapitan' Dolck,” li diras. „Mi ŝanĝigos ĝin kaj informos la Sekurecservo kaj Polico de ĉiuj landoj. Kaj ni atentos pri li ĉi tie. Sed estas strange, la polico de

van alle lande in kennis stel. En ons sal ons oë hier vir hom oophou. Maar dis vreemd, die polisie van Rio het op die oomblik met geen groot misdade te kampe nie. 'n Mens sou dit verwag het as so 'n man hom hier skuil hou.”

¹⁴Fritz knik. „Miskien was hy heel toevallig hier,” merk hy op. „Miskien op pad na êrens anders. Daar is selfs 'n baie geringe kans dat ek my misgis het.”

¹⁵Die Brasiliaanse Veiligheidshoof druk die knoppie van sy binnefoon en skakel 'n nommer. „Ons kan in elk geval hoor waar hy vanonggend afgeklim het,” sê hy. „Diego, stel vas waar lugtaxi RJ-B-9663 ongeveer 7.20 vm. 'n passasier afgelaai het. Dankie.”

¹⁶Die Veiligheidshoof sit die hoorbuis neer en draai weer na Fritz. „Mag ek vra wat jy in Amasonas gaan maak, luitenant?”

¹⁷„Ek gaan as gewone burger, generaal,” antwoord die Suid-Afrikaner. „Met vakansie. Maar daar is 'n bykomende rede.”

¹⁸„Ja?”

¹⁹„'n Goeie vriendin van my wil die Mediese Navorsingsentrum

Rio êi-momente ne pritraktas iujn ajn krimegojn. Oni atendus tiajn se tia homo tie êi sin kaŝas.

¹⁴Fritz kapjesas. „Eble li tute koincide estis tie êi,” li diras. „Eble survoje al ie alia. Eê estas iomete eble, ke mi eraris.”

¹⁵La Brazila Sekurecestro premas butonon de lia interna telefono kaj telefonas numeron. „Ni êiukaze povas aŭdi kie li êi-matene eliris,” li diras. „Diego, informiĝu kie aertaksio RJ-B-6693 pli-malpli je 7.20a a.t.m lasis pasaĝeron. Dankon.”

¹⁶La Sekurecestro remetas la aŭdigilo kaj turnas sin denove al Fritz. „Kion vi faros en Amasonas leŭtenant', mi petas?”

¹⁷„Mi iras kiel ordinara civitano,” respondas la Sudafrikano. „Feriante. Sed estas aldonan kialon.”

¹⁸„Êu?”

¹⁹„Bonan amikino de mi volas viziti la Centron por Medicina Esplorado norde de Manaus - kiel Sudafrika notisto, êu vi komprenas. ŝia laboro igos, ke ŝi troviĝos en danĝeraj lokoj.”

²⁰Generalo Camoes ridetas komprenante. „Mi komprenas. Vi iras por kontrolumi.”

benoorde Manaos besoek - as Suid-Afrikaanse boekstaver, verstaan u. Haar werk sal meebring dat sy in gevaarlike gebiede kom.”

²⁰Generaal Camoes glimlag begrypend. „Ek verstaan. Jy gaan om 'n ogie te hou.”

²¹„Ja,” sê Fritz. Hy het onmiddellik besluit om nie die hele rede vir sy besoek te verklap nie. As doktor De Klerk se vae vrese gegrond is en 'n militêre speurder werklik in Amasonas nodig is, behoort dit eintlik 'n lid van die Brasiliaanse Veiligheidsdiens te wees. Fritz wil nie daarvan verdink word dat hy op ander se terrein oortree nie. Voordat hy nog iets kan sê, brom die binnefoon. Die Veiligheidshoof lig die hoorbuis. „A, Diego,” sê hy. „jy't gou gemaak. Die poskantoor? Geen verdere inligting nie? Nou goed, dankie.”

²²Weer sit hy die hoorbuis neer en draai na Fritz. „Dis soos jy vermoed het,” sê hy. „Dolck - as dit hy was - het op die dak van die hoofposkantoor afgeklim. Dit is 'n baie groot gebou met 'n observasiedak waar honderde toeriste elke dag gaan om oor die stad uit te kyk. Daar kon hy soos 'n groot speld weggeraak het.”

²³„Ja, dan help dit niks. In elk geval, baie dankie vir u hulp, generaal,” sê

²¹„Jes,” Fritz diras. Li tuj decidis ne klarigi la tutan kialon por lia vizito. Se la malprecizaj timoj de doktoro De Klerk konfirmiĝos, kaj armea detektivo vere bezoniĝos en Amasonas, devus esti membro de la Brazilia Sekurecservo. Fritz ne volas suspektiĝi pro tio ke la invadas alies terenon. Antaŭ li povas diri ion plu, la interna telefono sonoras. La Sekurecestro levas la aŭdigilo. „Ha, Diego,” li diras. „vi rapidis. ĉu la poŝtoŭicejo? ĉu neniam aliaj informoj? Nu bone, dankon.”

²²Ree li remetas la aŭdigilo kaj turnas sin al Fritz. „Estas kiel vi suspektis,” li diras. „Dolck - se ja estis li - eltaksiĝis sur la tegmento de la ĉefa poŝtoŭicejo. Estas tre granda konstruaĵo kun tegmenta observejo kien centoj da turistoj ĉiutage iras por observi la urbon. Tie li povus malaperi tre facile.”

²³„Jes, do ne helpas. ĉiukaze, dankegon pro via helpo, general',” diras Fritz. „Se vi forpermesus min...”

²⁴„Certe, sed atendu momenton,” respondas la alia kaj haste surpaperigas kelkajn vortojn sur papereton antaŭ li. „Se iam ajn vi bezonas helpon, leŭtenant' Deelman, jen la kodvortoj niaj por la venontaj

Fritz. „As u my sal verskoon...”

²⁴„Seker, maar wag 'n oomblik,” antwoord die ander en krap haastig 'n aantal woorde op 'n stukkie papier voor hom. „As jy ooit hulp nodig het, luitenant Deelman, hier is ons kodewoorde vir die volgende tien dae. Elkeen is 'n variasie op die vorige, dus baie maklik om te memoriseer. As jy wil, kan jy dit nou doen.”

²⁵Fritz lees die lys 'n paar keer aandagtig deur. Dan gee hy dit terug aan die Veiligheidshoof wat dit in die verbrandingsluik afgooi. Hierde eenvoudige lysie is een van die belangrikste geheime van die Veiligheidsdienste van elke vasteland, want dit is die grondslag van alle geheime boodskappe tussen lede van die diens. Diegene wat die kode wil gebruik, moet daardie bepaalde dag se sleutel ken.

²⁶Fritz bedank die generaal weer en neem afskeid. Enkele oomblike later is hy by Loeki in die lugtaxi.

²⁷Die donker Brasiliaan kom reguit op doktor De Klerk af waar hy by die vliegtuig staan en toesien dat 'n paar pakke ingelaai word. „Doktor Sandeiroz!” roep die Suid-Afrikaanse geleerde. „Ek is verheug

dek tagoj. ĉiu varias iomete de la antaŭa, do facilas parkeri. Se vi volas, vi povas tion nun fari.”

²⁵Fritz tralegas la liston atente kelkajn fojojn. Poste li redonas ĝin al la Sekurecestro, kiu forĵetas ĝin en la cindrigilon. ĉi tiun simplan liston estas unu el la plej gravaj sekretoj de la Sekurecservoj de ĉiu kontinento, ĉar ĝi estas la bazo de ĉiuj sekretaj mesaĝoj inter la membroj de la servo. Tiuj, kiuj volas uzi la kodon, devas koni la ŝlosilon por precize tiu tago.

²⁶Fritz denove dankas la generalo kaj adiaŭas. Postnelonge li estas kun Loeki en la aertaksio.

²⁷La malpala Brazilo rekte alproksimiĝas doktoron De Klerk kie li apude de la aerplano kontrolas, ke kelkaj pakoj enŝarĝiĝas. „Doktor' Sandeiroz” vokas la Sudafrika klerulo. „Mi ĝojas vidi vin.”

²⁸Doktoro Sandeiroz ridetegas. „Kaj mi ne povas esprimi kiom mi ĝojas ree akompani vin,” li respondas. „Permesu min prezenti mian asistanto - Tongú. Lastfoje, kiam mi vizitis vin en via ĝangalstacio, li ne povis kuniri.” Sandeiroz turnas kaj gestas mallongan indianon en

om u te sien.”

²⁸Dokter Sandeiroz glimlag van oor tot oor. „Dan kan ek u nie sê hoe bly ek is om weer te mag saamgaan nie,” werp hy teen. „Laat my toe om my assistent voor te stel - Tongú. Die vorige keer toe ek u in u oerwoudpos besoek het, kon hy nie saamgaan nie.”

²⁹„Tongú is 'n ware barbaar,” sê Sandeiroz draai om en beduie na 'n kort, donker Indiaan in Westerse drag wat doktor De Klerk beleef groet. in Esperanto sodat die inboorling nie kan verstaan wat hy sê nie, „maar hy is vir my van onskatbare waarde in my werk. Hy's so tuis in die oerwoud soos 'n vis in die water.”

³⁰„Maar waar het u hom gekry?”

³¹„In 'n sendingskool naby die Amasone. Hy is verbasend intelligent, en ek het hulle oorreed dat ek hom in Rio 'n beter opvoeding sou kon gee. Maar al die geleerdheid het niks aan sy primitiewe talente gedoen nie. Gits, doktor De Klerk, hy kan 'n jaguar op honderd tree ruik.”

³²Dokter De Klerk glimlag. „Ek sal graag later met hom gesels,” sê hy. „Maar eers, waar is u bagasie?”

Okcidentaj vestaĵoj kiu ĝentile salutas doktoron De Klerk.

²⁹„Tongú estas vera sovaĝulo,” diras doktor Sandeiroz doktoron Sandeiroz en Esperanto por ke la indiĝenuleto ne povu kompreni kion li diras, „sed li estas netakseble valora por mi en mia laboro. Li komfortas en la ĝangalo kia fiŝ' en la akvo.”

³⁰„Sed kie vi trovis lin?”

³¹„En misiista lernejo apud la Amazono Li estas surprize inteligenta, kaj mi konvinkis ilin, ke mi povas doni al li pli bonan edukadon en Rio. Sed la lernado ne tuŝis liajn primitivajn talentojn. Ho, doktor' De Klerk, li povas flari jaguaron de cent paŝoj.”

³²Doktoro De Klerk ridetas. „Mi ŝatus paroli kun li iom poste,” li diras. „Sed unue, kie estas via pakaĵoj?”

Ĉi tiun artikolon unue aperis en EKDO Bulteno 2002/1



SPORTO

Eĉ CAF bezonas Esperanton


Klarigoj surbaze de la ceremonio por futbalpremioj ĉe Hotelo Hilton en Durbano, la 15an de Februaro 2005

Elisée BY'ELONGO

En tiu artikoleto vi legos rektan ateston fare de interpretisto kiu laboris kun Afrika Futbala Konfederacio, aŭ franclingve *Confédération Africaine de Football* (mallonge *CAF*). La atesto emas demontri kiel Esperanto utilis en internaciaj aferoj, specife en la kazo de *CAF*.

Kiel rilatas?

Sed kiel ĉio tio rilatas kun Esperanto? Bone - pro tio ke multaj komitatanoj de la Konfederacio estas franclingvaj, *CAF*, Hilton (Hotelo) kaj Alliance Française sub-



skribis kontrakton, laŭ kiu interpretistoj dum supremenciitaj labor-sesioj kaj ceremonioj estu provizitaj de Alliance Française. Ĉar nur Mau-rice Houlet estas dungita kiel interpretisto, la administraj instancoj sen-dis la aŭtoron interpreti la anglan en la francan, tuj kiam s-ro Houlet interpretis la francan en la anglan. Laborinte duope mi konstatis kun elturniĝemo kiom bezonata Esperanto estas en Afriko, kaj ĉefe en Afrika Futbala

Polemiko: Sudafriko kaj CAF

Kun ampleksaj labortaskoj la Konfederacio restas grava organo, kiam temas pri Afrika futbalo. Kvankam preskaŭ ĉiuj afrikaj landoj reprezentigas, landoj en la suda duonsferon, principe Sudafriko, surtabligis koncernon, ke la konfederacio multe zorgas pri la problemoj kaj la sorto de franclingva Afriko.

Daŭriĝas sur paĝo 24

Konfederacio.

Praktikaj kaj Ekonomiaj Malavantaĝoj

Interpretado restas serioza funkcio dum la konfederaciaj aranĝoj. La komitato jam decidadas asigni kolosajn financajn rimedojn provizante tradukistojn kaj interpretistojn por plifaciligi la labor-sarĝojn ligitaj al komunikadekvacio. Multaj spertuloj konsentus kun nia atesto ke la malfacilecon interpreti dum laborsesio daŭras. Unu problemo estas, ke la intervenantoj ne haltas por/pro la interpretistoj. Partoprenantoj fluparolas ĉu la francan ĉu la anglan respektive tiel rapide, ke interpretistoj devas resumi la elparolon forlasante kelkajn frazojn. Plue, okazis, ke interpretistoj ne bone komprenis pro la akcento de la parolanto, ĉu araba, ĉu okcident-afrika – malgraŭ tio la parolanto devis daŭre pliparoli. Tial, se oni ne komprenis vorton aŭ frazon, oni elektis ataki la novan anstataŭ ol sindemandi mil kaj unu kialojn!

Alia problemo estis la manipulado de la aparatoj tra kiuj fariĝu la interpretado. Ĉar ambaŭ instruantoj de la franca utiligis la aŭskultigilojn kaj ties maŝinojn por la unua fojo, okazis, ke eraro fariĝis, kaj tio

kondamnis la laboron je alproksimiĝo anstataŭ ol perfekteco.

Korolarie, la tuta afero estas multekosta. Ĉiu kvar horoj interpretanto enspezas USD 250 usonaj aŭ proksimume ZAR 1500. Preskaŭ kvarope la sumo konstituante la salajron de instruisto po horo ĉe subvenciata instituto kiel Alliance Française. Nun eĉ sen matematikaj kalkuladoj, sen okulvitroj, ĉiu komprenos, ke se tiaj interpretaj laborsarĝoj okazas regule, *CAF* elspezas multe da mono.

Se nur la Afrika komisiono provus Esperantigi kelkajn eminentulojn, kiel Issa Hayatou (prezidanto de *CAF*), Molefi Oliphant (vic-prezidanto), Dr Amos Adamu, Moses Baransaniye, aŭ Slim Chiboub (komitatano de FIFA), aŭ se multaj asocioj verdiĝus, la afrika kontinento kune kun la futbala konfederacio ŝparus kolosajn sumojn, kaj glate laborus. Ĉu ni kiel interpretistoj aŭ pli bone interpretantoj perdus nian laboron?



INTERRETO

Ret-gazeto “La Amikeco”

Por revemaj junaj studentoj, poetoj, artistoj, sciencistoj, agantoj...”

Johan KOHLER

Tiel oni priskribas la reta gazeto *La Amikeco* (www.la-amikeco.net). Ĝi estas kunlabora projekto de Esperantistoj en Ĉinio, Koreio, Japanio kaj Vjetnamio. Jam aperis 10 numeroj, kaj laŭ la ĉefpaĝo havas 1727 legantojn.

Tre okulfrapa, kiam oni vizitas la retejon, estas la belaj bildoj kaj desegnoj kiujn troviĝas en (kaj inter) artikoloj. Fakte, mi eksciis pri la gazeto serĉante Esperantajn bildrakontojn. La unua numero temis pri bildrakonta serio, kiu reklamas Esperanton en multaj lingvoj.

En la nuna numero, la artikoloj estas tre diversaj: “Murpaperoj kiuj

temas la kalendaron 2005”, “Printempa Festo de Ĉinio”, “Bonsortaj superstiĉoj en la ĉilia novjara celebros”, “La novjaro en Hispanio”, “La novjaro en Francio”, “Persiko kaj vjetnama novjaro”, “Komence de la Januaro 2005 naskiĝis FAROS” (junulara grupo de Koreio), “Esperanta Rostita Rizaĵo”, kaj fine sinprezento de iu “Nova vizaĝo”. La artikolojn estas skribitaj per sufiĉe facila lingvaĵo, kaj ili estas bele ilustritaj.

“La Amikeco” estas vere mirinda kaj entusiasmiga publikaĵo, kiu donas interesajn vidpunktojn el Azio, kaj la tuta mondo. Nepre vizitu ĝin!



www.la-amikeco.net

ESPERANTUJO

Unu somera semajno tendume kun 40 Esperanto-parolantoj

Someraj ferioj – la ĉefa okazo en la jaro de sin ripozi, dormeti sub-arbe en la herbaro, pasigi posttagmezojn babilante senhaste kun amikoj, kaj profiti de longaj varmaj vesperoj. Certe ni ĉiuj antaŭĝojas tiujn semajnojn!

Magali kaj Harro VON BLOTTNITZ

Por ni kaj nia filino Maïwenn (tiam 20-monata), tiu tempo pasintjare jam alvenis en Aŭgusto (ni ja estis en Eŭropo), kaj kun aparta diferenco: ni partoprenis dum unu semajno en somerferia renkontiĝo de Esperanto-parolantoj. La scenejo de tiuj niaj ferioj estis vilaĝo en la okcidenta parto de Germanio, iom sudokcidente de la eks-ĉefurbo Bonn, en la Eiffel-montareto.

La asocio Esperantoland tie luis por du semajnoj skoltan hejmon kaj ofertis loĝeblecojn aŭ en ĉambroj aŭ ĝardene por tiuj, kiuj volis tendumi. Ni estis feliĉaj, ĉar familianoj pruntedonis al ni tendon, kiu fariĝis nia hejmo por 7 noktoj.

Partoprenis la renkontiĝon entute pli-malpli 60 personoj, sed (kiel ni ne ĉiuj restis la tutan tempon. Ni tamen havis la eblecon ferii kun 40

personoj, kaj surprizis nin (preskaŭ-veteranojn de la esperanto-movado), ke ni inter tiuj konis ne pli ol dek. Estis tie familioj kaj senpartneruloj el Nederlando, Belgio, Francio, Bretonio (kvankam tiu regiono estas en Francio, ĝi aparte menciindas ĉar kelkaj bretonaj partoprenintoj parolis inter si la bretonan kaj ne la francan lingvon), Anglio, Germanio, Pollando – kaj kvaropa grupeto el Rusio.

Cetere, aparte ĝojigis nin ke estis iu juna partoprenanto el Zimbabvo, samideano Kelly Londoni, kiu tie riprezentis la Amikecan Klubon de Harare. Estis preskaŭ miraklo, ke Kelly ĉeestis tiun renkontiĝon – li ja sukcesis akiri vizon kaj pruntepreni monon por financi la vojaĝon. Ĉiuj partoprenintoj ĝuis lian ĉeeston kaj multaj iris aŭskulti lian prelegon pri Zimbabvo.



Supre: Gimnastiko sur la herbaĵo

Krom ni, du familioj estis inter-naciaj: unu german-itala, la alia german-ĉina.

Infanoj abundis, de unu jaro al pli ol sesdek (!). Kelkaj el la infanoj estis denaskaj esperantistoj, aparte la 13-jara filino de la ĉeforganizinto Lu, kiu vere flue parolis esperanton. Aliaj iomete, aŭ eĉ tute ne regis esperanton: tiuj sekvis porkomencantan kurson. Sed ĝenerale, lingvoproblemoj ne malhelpis ilian kunludon. Longe tamen ni memoros la rimarkon de 3-jara franca Vjolet al sia patrino pri sesjara knabo kiu parolis nederlandlingve: “tiu granda infano ankoraŭ ne tre bone parolpovas”...

Certe ĉiuj profitis de la granda ĝardeno. La malpli-ol-dekjaruloj aparte ĝuis la grimpludilojn, kaj la lastan posttagmezon malkovris tutan heĝon de bongustegaj beroj rugaj, kiujn ili buŝplene devoris. Pli grandaj infanoj ŝakludis, kelkfoje kun granda entuziasmo. Kaj plenkreskuloj korpekzercis en la ĝardeno.

Manĝoj estis preparitaj por ĉiuj kune, kaj la manĝotempoj estis aparte bona tempo ekkoni novajn vizaĝojn. Tion oni tamen ankaŭ povis fari dum la kursetoj kaj prelegetoj dumtage, aŭ dum la vesperaj ludhoroj. Interese estis la tutsemajna ŝakkonkurso kiu certe por la knaboj de ĉiuj aĝoj estis ebleco montri siajn cerbajn musklojn. Finfine gajnis ruso – sensurpriza rezulto se oni scias pri la granda apogo por la ŝakludo en lia lando.

Ankaŭ vespere oni ofte kunkantis, bedaŭrinde preskaŭ neniuj tamen parkere konis kantojn – tiel ke apud la fajro esti pli da ‘la-la-la’ ol vera kantado. El antaŭaj someraj renkontiĝoj ni havis pli bonajn memorojn tiu-rilate...

Kiel kutime en internaciaj esperantorenkontiĝoj, la lasta vespero okazigis internacian scenejon, kie individuoj aŭ grupoj el ĉiuj landoj prezentis kantojn, skeĉojn, poemojn laŭ siaj plej bonaj povoj. Tre impona estis la interkantado (en bretona lingvo) de la 16-jaraĝa bretonino Kupaja kaj ŝia patro. Amuzegis nin poemo rusa de la fama verkisto Tolstoj pri hundeto kiun sinjorino sendis trajnvojaĝe al Moskvo: pro komplikaj cirkonstancoj la hundeto post nur kelkaj tagoj fariĝis hundego....

Kaj pri vivo en tendo dum unu semajno? Tio tre glate funkciis eĉ kun infaneto kaj ni do proponas ke dum la venonta tutregiona kongreso (vidu apude →) ni ripetu tiun eksperimenton kune.



ANONCO

Tutregiona Semajna Kongreseto!

en Kaburbo, ĉirkaŭ marto 2006

*Ne forgesu jam
enalendarigi la plej grandan
esperanto-eventon de la jaro 2006
en Suda Afriko: nian tutregionan
kongreseton. Invitu viajn
eksterlandajn amikojn por viziti vin
dum tiu tempo!*

*Post Durbano en 2002
kaj Pretorio en 2004, ĉi-foje la
kongreseto okazos ĉe Kaburbo.*

*Ni ankoraŭ estas planantaj la
detalojn, sed vi ekscios baldaŭ tra
ĉi-tiu revuo. Se vi havas sugestojn,
dezirojn, aŭ ŝatus kontribui al la
preparado de la kongreseto,
kontaktu:*

Magali kaj Harro
retpoŝte:
magali@xsinet.co.za
telefone: 021 448 6775!

ĈU VI MEMORAS?

Verlingvaj Etikedoj

Ĉu vi memoras kiel vi ĝoj-miris kiel junulo, kiam vi vidis alilingvan etiketon sur aĉetaĵo? Eble sur Franca vino aŭ Norvegaj sardinoj aŭ Bulgara spicbotelo?

Axel VON BLOTTNITZ

Kiel junulo en Germanio mi ne lernis ion de tiuj lingvoj sed gaje legis kaj komprenis tiujn etiketojn. Ĉetable la familio ŝatis legi kaj preparoli ilin kaj sentis apartenon al Europo kaj al la mondo per la praktika tuŝo al la fora sed parenca kulturaĵo enmane.

Kiam ni akompanis la patrinon al la butikoj ni lernis diskriminacii kontraŭ Germanlingvaj etiketoj sur Francaj vinoj, kontraŭ Anglalingvaj etiketoj sur Portugalaj sardinoj k.t.p. Prefere ni aĉetis la produktojn sub etiketoj en la lingvo de la laboristoj kaj fabrikistoj kiuj fieru pri ili. Per tia aĉeto oni gajnas ne nur la produkton sed ankaŭ fenestreton al ties krekulturo. Tio plusa valoro gravas al mi.

Erare la vinproduktantoj en Sud-Afriko opinias, ke en Europo ne tiel facile vendiĝus niaj vinoj sub Afrikansaj etiketoj ol Anglaj. Verŝajne estus inverse. Preskaŭ ĉiuj niaj vinoj nun portas Anglajn etiketojn eĉ enlande, kvankam ne



***Supre:** Verlingva etiketo de itala fromaĵo*

eĉ unu farmlaboristo kaj preskaŭ neniuj bienposedantoj hejmas Angle. Estas pli kaj pli malfacile trovi enlande vinon kun verlingva etiketo. La konsumantoj grumbas sed aĉetas tamen la kontraŭverklinitajn etiketojn. Mi ankoraŭ trovas tut-

Afrikansajn post longa serĉo, sed kelkfoje lacas kaj pli ofte simple aĉetas Portugalan ruĝvinon, ekz. Dão, kion mi tre estimas.

Nederlandaj produktoj kiel *Appelstroop*, *Conimex* Indoneziaj spicoj, fromaĝoj k.t.p. ankoraŭ vendiĝas nederlandlingve, sed la Germanaj ĉesis jam delonge transoferti al la konsumanto ian spiron aŭ atmosferon el la kreloko.

Post la ĝenerala enkonduko de la Internacia Lingvo, ĉu oni ankoraŭ preferos Francan vinon France etikedata? La kulturamantoj certe ja!



:-) :-) :-) :-) :-) :-) **HUMORO**

Kruko: Dio, mia kara Dio, kion signifas por vi miljaro?

Laŭta voĉo el ĉieloj: Miljaro? Ne pli ol sekundon.

Kruko: Dio, mia bona Dio, kion signifas por vi miliono da dolaroj?

La voĉo: Miliono da dolaroj? Ne pli ol cendon.

Kruko: Ho, Dio, kara Dio, ĉu vi povus doni al mi cendon?

La voĉo: Certe. Atendu sekundon...

Polemiko (daŭrigata)

Tiu “varma terpomo” ne plu englutiĝis kiam la teknika komitato decidis forlasi McCarthey (RSA) kaj Adebayor (Togolando), kiuj esperegis nomumiĝi afrikaj futbalistoj de la jaro 2004, sed kiuj bedaŭrinde malkvalifikiĝis. Laŭ *CAF* McCarthey pli bone footballudis en Eŭropo ol li faris en la afrika kontinento.

Tiu akra respondo de *CAF* bedaŭrinde ne sukcesis kontentigi la soifon de Sudafrikaj amaskomunikiloj, kiuj vidis en la administrado de la Konfederacio franclingvan emancipon kaj komploton respektive Samuel Eto (Kamerunio), JJ Okoĉa (Niĝerio) kaj D. Drgeba (Eburbordo) elektiĝis la plej gravaj afrikaj futbalistoj.

Kun fermitaj manoj, okulfrapa sinteno kaj kriegaj voĉo, Sudafriko malaprobis la elekton, kaj alvokis aliajn landojn iniciati refleksivan proceduron por la venontaj premioj.



FACILA

Korespondi deziras...

Esperanto donas al lernanto la eblecon renkonti homojn de fremdaj landoj en diversaj manieroj. Unu maniero estas korespondado.

Johan KÖHLER

Korespondi signifas “komuniki per letero”. Korespondado estas bonega maniero por komencantaj Esperantistoj renkonti kaj komuniki kun amikoj de fremdaj landoj.

Korespond'ad'o estas *skriba* komunik'ad'o: lernantoj ofte povas legi kaj skribi Esperanton antaŭ ol ili povas flue paroli. Kiam oni komunikas skribe, oni povas serĉi vortojn en vortaro kaj pensadi pri gramatiko – tre utila por komencanto.


Dua avantaĝo certe estas la kosto. Por korespondado oni ne bezonas multe da mono. La kosto sendi leteron (la “afranko”) estas multe malpli ol la kosto de eksterlanda vojaĝo.

Danke al Inter'reto (*internet*), retpoŝto kaj mesaĝiloj, oni povas komuniki pli facile kaj pli rapide ol antaŭe. Tamen, oni povas ankoraŭ korespondi per papera poŝto. Mi preferas papera poŝto – estas tre agrabla ricevi leteron kun fremdaj poŝtmarkoj!

Se vi deziras korespondi, vi povas sendi korespond'peto al revuoj kaj korespond-servoj. En la korespondpeto vi povas prezenti vin mem. Ekzemple: kie vi loĝas, kiom vi aĝas, kion vi ŝatas, k.t.p.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis korespondpeton el Aŭstralio, de s-ro Kevin Robb. Lia letero aperas sur la venonta paĝo.

Kvankam korespondado estas taŭga por komencantoj, ili ofte ne kuraĝas skibi al fremda homo. Por helpi komencantojn, mi proponas komunan korespondadon. Ĉiuj, kiuj interesas korespondi kun Kevin povas sendi sinprezentojn kaj demandojn al la Redaktoro, kiu sendos ilin kune¹ al Kevin, kaj vi legos la respondojn en la venonta Bona Espero.


Legu la korespondpeton sur paĝo 26. 

1 Petu la adreson de Kevin Robb de la redaktoro se vi deziras rekte korespondi.

KORESPONDPETO

Letero el Aŭstralio

Jen korespondpeto ricevita de Aŭstralio. Legu la artikolon ĉi-supre por pli da detaloj...



Saluton!

Mia nomo estas Kevin Robb, kaj mi loĝas en Aŭstralio. Mi trovis vian adreson je la interreto, kaj mi esperas, ke esperantisto de via lando korespondos kun mi.

Mi loĝas en la Or-Marbordo (Gold Coast), kiu estas urbego 100 kilometrojn sude de Brisbano (Brisbane), la ĉefurbo de Kvinslando (Queensland). Ĝi estas fama turista regiono pro la plaĝoj, golf-ludejoj, sub-tropikaj pluv-arbaroj, sukerkano- kaj banano-farmoj, kaj amuz-parkoj. Proksimume 500,000 homoj loĝas en mia urbego.

Mi estas 35-jara, kaj mi havas fianĉinon Andreyra (33-jara), kaj 8-jaran stiftilinon Danielle. Ili estas de Nov-Zelando. Mi laboras por nacia telefona firmao kiel telefonisto. Plaĉas al mi legi, naĝi, vidi kinofilmojn, kaj vojaĝi.

Mi lernis Esperanton antaŭ 8 jaroj, sed bedaŭrinde nek Andreyra nek Danielle parolas en Esperanto. Mi preferas korespondi e-poŝte, sed mi volonte korespondos per leteroj kaj aerogramoj.

